

Theodor Storm,

Fore

tradukita de Manfredo Ratislavo

La erikejo kuŝas en
la varma tagmezsuna brilo;
kaj ĉirkaŭ la ŝtontomboj jen
ruĝbrilo flugas tra l' trankvilo.³
La herboj floras, la odor'
en la aeron ŝvebas sor.

Skaraboj hastas tra l' herbar'
en siaj bluaj kirasetoj,
pendigas sin la abelar'
ĉe l' de l' erik' sonoriletoj.⁴
Svingiĝas birdoj tra l' aer' –
alaŭda kant' en la eter'.

Prilumigite de la sun'
kaduka staras jen kabano,
rigardas el la pordo nun
abelojn siajn kamparano;
kaj lia filo apud li
eltranĉas fluton jen por si.

...

³aŭ: ruĝbrilo flugas en trankvilo.

⁴aŭ: al de l' erik' sonoriletoj.

Vibradon de l' tursonoril'
apenaŭ aŭdas la oldulo,
ekdormas li en la trankvil',
fermiĝas sonĝe la okulo.
- Ne venis la malkvietec'
de l' nova temp' al ĉi solec'.

*Traduko de la Germana poemo "Abseits" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 - †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2001-04.*

MR-348-1b / Arg-182-368 (2004-02-24 08:11:42)